

# 悪業の連鎖

## *Ĉeno de Malbonaj Agoj*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

嘆息せざるをえない事件が、新聞やテレビやインターネットで毎日のように報じられます。

たとえば、川崎市で13歳の少年が年長の少年等によって残忍な方法で殺害された事件。この事件の異様な残虐性には唾然とするばかりです。殺害された少年の恐怖や痛み苦しみはいかばかりだったことでしょう。そして同時に加害者の少年の心の闇も気になるところです。

新聞報道によれば、加害者の少年Aは、幼い頃に家庭内で虐待を受けていたそうです。このことがAの人格形成にマイナスの影響を与えたであろうことは十分に想像されます。むろんだからといって、Aの罪が軽くなるというものではありません。「Aを死刑にせよ」「少年法を改正して成人並みの刑罰を与えよ」という意見にも一理あるかとは思いますが、Aの教育および監督責任をおうべき親もまた、むしろそれ以上に罪を問わなくてはならないのではないのでしょうか。

仏教では因果を重視します。この事件の原因は何か？それをつきつめていけば、親の責任はむろんのこと、さら

Preskaŭ ĉiutage ĵurnaloj, televidoj kaj retejoj raportas pri aferoj priĝemendaj.

Ekzemple la afero, ke 13-jara knabo estis mortigita kruele de pli aĝaj knaboj en Kawasaki. Antaŭ la eksterordinara krueleco de tiu ĉi mortigo mi perdis vortojn. Kia estis timo kaj doloro de la mortigita knabo? Kaj samtempe mi ne povas ne rimarki mallumon de la koro de la mortiginta knabo.

Laŭ ĵurnalo, mortiginta knabo (mi nomu A anonime) estis kruele traktata en sia hejmo, kiam li estis infano. Oni povas facile diveni, ke tio ĉi negative influis formiĝon de lia personeco. Komprenoble mi ne diras, ke lia kulpo estas malpezigita pro tio. Kelkaj asertas, ke A devas esti mortpunigita, aŭ ke oni devas amendi la nunan leĝon por junulo por ke junulo estu punigita same kiel adolto. Tia opinio eble havas ĝustan rezonon. Sed laŭ mi, la gepatroj de A, same kiel A, aŭ eĉ pli severe, devus esti akuzata, ĉar ili respondecis pri edukado kaj gvido de sia filo.

Budhismo emfazas la rilaton de kaŭzo kaj rezulto. Kio estas la kaŭzo de tiu ĉi afero? Se ni serĉas ĝin radikale, ne nur la respondeco de liaj

にはその親を育てた親（祖父母）の責任さえ問われなくてはならないでしょう。「虐待は連鎖する」と言われます。暴力行為を受けたものが、暴力を異常なことと認識できなくなり、自分がまた暴力をふるうようになるケースが多いそうです。これは運動系部活動における暴力の連鎖にも同じことが言えます。

少年法を改正せよとの声が世間には強いのですが、単に刑事罰を強化するだけでは少年犯罪が減るとは思えません。加害少年には相応の罰を負わせることは必要ですが、その両親にも教育・監督責任を厳しく追及することを可能にするような法改正が必要だと思えます。

ものごとにはすべて原因がある、これは今国際問題となっているイスラム過激派によるテロリズムにも同じことがいえます。なぜこのようなテロリズムが発生するのでしょうか。テロリズムは必ずしもイスラム教に由来するとはいえません。たとえばヒンズー原理主義テロリズムもあります。正戦論はキリスト教思想家によって提唱されましたし、聖戦はイスラム教だけのものではありません。ほとんどのイスラム教徒はテロリズムを非難していますから、イスラム教とテロリズムは別の事柄です。

私は最近、ある戦場カメラマンによる講演会に参加しました。いろいろな写真を見せていただいたのですが、そ

gepatroj sed ankaŭ tiu de iliaj gepatroj (liaj geavoj), kiuj edukis liajn gepatrojn, devus esti akuzataj. Oni diras, "Kruela traktado ĉene daŭras." Tiu, kiu estis ripete perfortita, ne povas juĝi ke perfortado estas eksterordinaĵo, kaj mem perfortas aliajn homojn. Tiel ofte okazas. Tio ĉi sama direblas ankaŭ en la kazoj de ripetata perfortado en sportaj kluboj en lernejoj.

Multaj opinias, ke amendo de la leĝo por junulo estas necesa. Mi ne pensas tamen, ke krimoj fare de junuloj malmultiĝas per pliseverigo de kriminala puno. Estas necese ke junulaj atencintoj estu punitaj. Islamo adekvate, sed se amendi leĝon, ĝi devus esti tia, kiu ebligas akuzi iliajn gepatrojn pro la respondeco eduki kaj gvidi ilin.

Ĉiuj aferoj havas sian kaŭzon. Tio estas vera ankaŭ en la kazoj de terorismo de islama ekstremismo nun furoranta internacie. Kial terorismo ekestas? Oni ne povus diri, ke ĝi devenis de Islamo. Terorismo ekzistas ankaŭ en hindua fundamentalismo. Teorio de ĝusta milito estis proponita de kristanaj teologoj. La ideo pri sankta milito ne estas propraĵo apartenanta al Islamo. Preskaŭ ĉiuj islamanoj riproĉas terorismon. Do, Islamo kaj terorismo estas tute aliaj aferoj.

Lastatempe mi partoprenis en prelego de iu fotisto de batalkampoj. Li montris kelkajn fotojn, inter kiuj unu estis por mi tre impresa. Temis iu urbo

の中の1枚が印象的でした。イラクのある町で、それは子どもたちの憎しみに満ちあふれた眼差しでした。彼らの父親は米軍兵によって射殺されたのだそうです。たまたま米軍の横を車で通りかかって目が合った、それで米兵がテロリストと誤認して銃を撃った、というのです。この光景を撮った講演者にも、空から戦闘ヘリが銃で狙っていたそうです。この米兵は軍法会議にかけられることもなく、賠償もしませんでした。誤射した米兵にもそれなりの理由があったのでしょうか。いつテロリストが襲ってくるかもしれない緊張状態の中で、体が過剰に反応するようになってしまったのだと思います。

講演して下さったカメラマンのお話では、友人や親族を殺された恨みをはらすため、あえて志願して自らがテロリストになる人がかなりあるのだそうです。あるいはテロリストに謝礼を払って恨みをはらそうとすることもあったそうです。

殺人や暴力などの非道な行いは、その後憎しみを残します。その憎しみが次の非道な行為の原因になります。それを逆にいうならば、あらゆる非道な行いには必ずそれを惹きおこした原因があるはずです。どうしたらこの悪の連鎖・スパイラルを断ち切ることができるのでしょうか？簡単には答の出ない問題ですが、全体として暴力行為（犯罪や戦争）は件数として減少していることに希望があります。

en Irako. Kelkaj knaboj estis fotitaj, kaj iliaj okuloj estis plenaj de malamo. Ilia patro estis mortpafita de usona soldato. Li foje veturigis aŭton tuj proksime de usona bazo, kaj hazarde okuloj de li kaj usona soldato renkontiĝis. La soldato miskomprenis, ke li estas teroristo, kaj pafis lin. Ankaŭ la preleganton, kiu fotis tiun ĉi scenon, pafiloj de batala helikoptero celis de supre. La usona armeo ne enketis la soldaton en militkortumo, nek pagis damaĝkompenson. Eble la mispafinta soldato havis sian kialon. En la streĉa situacio, en kiu teroristo povas ataki ĉiam ajn, soldatoj nature montras ekscesan respondon (*hyperarousal* aŭ *fight-or-flight response*, angle)

Laŭ tiu ĉi fotisto -preleganto- multaj fariĝas memvole teroristoj por venĝi mortigitajn amikojn aŭ parencojn. Aŭ aliaj pagas monon al teroristoj por peti de ili fari venĝon.

Mortigo, perfortado kaj aliaj malhumanaj agoj nepre postlasas malamon, kiu fariĝas motivo de sekvaj malhumanaj agoj. Se diri la samon renverse, ĉiuj malhumanaj agoj nepre havas siajn kaŭzojn. Kiamaniere ni povas tranĉi tiun ĉi ĉenon aŭ spiralon de malbonaj agoj? Estas demando ne facile respondebla. Restas tamen espero, ĉar perfortadoj - krimoj kaj militoj - malmultiĝas en la tuto.